PILO-PRESS
Internacia Informservo

Jara abonkotizo
30,- GM

KRONACH
invitas

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 9/1974 - 1 marto 1974
Aperas ĉiusemajne

## Programo de la postkongreso en Kronach

Kronach (pp) La trafikoficejo de la urbo Kronach transsendis al la Esperanto-gazetaro ampleksan esperantlingvan materialon pri la postkongreso de la 3 - 10 aŭg 1974. Resume ni publikigas la programon:

Sabate, 3 aŭg 74 Post la UK en Hamburgo la partoprenantoj kolektiĝas tagmeze en la ĉefa stacidomo de Hamburgo por komuna fervoja veturado al Kronach. Ekde la 21a horo en Kronach senĝena kunveno.

Dimanĉe, 4 aŭg 74 Diservoj, akcepto antaŭ la Urba Domo, komuna tagmanĝo en la kongresejo, vizito al la Fortikaĵo kun muzeo, promenado tra la urbo. Vespere je 20a horo: Diskuto kun urbanoj en la kongresejo.

Lunde, 5 aŭg 1974 Tuttaga ekskurso al Coburg

Marde, 6 aŭg 1974 Komuna migrado tra la rava pejzaĝo, Folklora Vespero

Merkrede, 7 aŭg 1974 Tuttaga ekskurso al Bamberg, Pommersfelden, Vierzehnheiligen

Jaŭde, 8 aŭg 1974 Tuttaga ekskurso tra "Naturparko", al Kastelo Lauenstein, Valbarejo, vizito al bierfarejo. 19.oo h Inaŭguro de la Pafista Festo (amuziĝo en kaj antaŭ tendo-halegoj kun blovorkestro, gastronomiaj specialaĵoj, karuseloj ktp.)

Vendrede, 9 aŭg 74 Posttagmeze renkontiĝo ĉe la Pafista Festo, vespere lumbildprelego

Sabate, 10 aŭg 74 Koncerto en la Pafista Festo, gaja kunestado de samideanoj kaj urbanoj; kunveno de kolektantoj de poŝtmarkoj kaj moneroj, Koncerto de bondeziroj, Loterio en la Urba Domo, Solena Fermo.

Pliaj informoj kaj aliĝiloj haveblas ĉe: Fremdenverkehrsamt - Esperanto - Postfach 510, D-864 Kronach

## Rimarkoj pri la publika diskuto

Pri la celo de la publika diskuto en Kronach okaze de la postkongreso Ludwig Robel, Kronach, skribas: " Dimanĉe, la 4an de aŭgusto, okazos vespere diskuto kun la enloĝantaro, kiu ĉefe celas al personaj kontaktoj inter esperantistoj kaj neesperantista publiko. La vizito de multnacia publiko en Kronach estas unika ŝanco, demonstri la lingvoproblemon kaj pruvadi la taŭgecon de Esperanto por internaciaj rilatoj. Ni intencas atingi, ke la partoprenantaro interparolas diverslingve, ne nur esperantlingve. Multaj neesperantistoj, lernintaj fremdan lingvon, havu la okazon paroli kun alilandanoj, kio estos pro antaŭvideblaj malfacilaĵoj en la kompreniĝado por ni la plej bona okazo demonstri, ke per Esperanto eblas la plej flua kaj la plej senkomplika konversacio. Samideanoj, kiuj estas pretaj funkcii kiel kunlaborantoj kaj kapablas gvidi diskuton, bonvolu sin anonci."

Homo kaj Kosmo Jus aperis la 3a numero 1973. La 4a numero 1973 aperos post unu monato. Dum 1974 Homo kaj Kosmo aperados regule. Mendu la revuon ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113. Jara abonprezo 5,50 DM. aŭ rekte ĉe Zvjezdarnica, Opatička 22, YU-41103 Zagreb, Poŝtfako 38, Jugoslavio.

## Homoj kaj Nomoj
### kun kaj sen Renomoj

D-ro Joseph Holtmann, Beckum, mortis post mallonga, grava malsaniĝo la 14 feb 1974. D-ro Holtmann naskiĝis en la jaro 1896 kaj estis longjara batalanto por Esperanto. Ankoraŭ antaŭ kelkaj semajnoj li skribis al Pilo-Press: " Kiel obstina vestfalo mi ne pensas rezigni batalon por ideo, kiun mi trovis ĝusta."

Prof. d-ro Helmar Frank, Paderborn, honora prezidanto de Gesellschaft für Programmierte Instruktion (Societo pri Programita Instrukcio), invitis Hermann Behrmann, Löhne, prezenti prelegon pri la lernado de planlingvo kaj spertoj en diversaj landoj dum Simpozio pri Programita Instrukcio meze de aprilo en Wiesbaden. Hermann Behrmann gvidos ankaŭ la 6an laborkomunumon dum la Simpozio. Akompanareferento estos D-ro Hans Kasselmann, Paderborn, kiu prezentos la plej freŝajn rezultojn el siaj propraj studoj pri komputer-subtenata instruado.

Harald Schicke, Hamburg, la unua "Esperanto-abituriento", nuntempe soldatservas en "Bundeswehr". Ankaŭ inter la germanaj armeanoj li varbas por Esperanto.

Ambasadoro Ralph Harry, Bonn, informis, ke la Estraro de UEA decidis, ke estas pli utile subteni agadon inter la skoltoj ol inter sportistoj.

G. Vanbreuse, Ma Campagne 319, B-4800 Verviers, Belgio, serĉas gastigantojn por siaj Esperanto-lernantoj (14 - 15jaraj), speciale en FRG kaj Danlando. Interesuloj turnu sin al li!

Richard Stumpf, Gaggenau, fervora nova esperantisto, kasisto de la Popolaltlernejo Gaggenau volas enkonduki Esperanton en la popolaltlernejon.

*************

## Mallongaj informoj

La Tria Internacia Kongreso de Kristanaj Esperantistoj (35a de IKUE kaj 26a de KELI) okazos de la 20a ĝis la 27a de julio 1974, en Jugendpark, Hamburg-Langenhorn. Pliaj informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe la prov. sekretario de IKUE, s-ro F. Galbusera, V. Ghiacciaia, I-37100 Verona, Italio, kaj ĉe la sekretariino de KELI, f-ino Tini Putto, Weerdestein 43, E d e 6100, Nederlando. Laŭeble estas petata aliĝo antaŭ la 15a de aprilo 1974.

Renkontiĝo en Mericourt. Post vigla komitata kunveno, kiu preparis la tagordon, plurnacia Esperanto-renkontiĝo okazos en Mericourt apud Lens, dimanĉon la 10 marto 1974. El la programo: Temoj pri ekspozicioj, turismo, akcepto de eksterlandanoj, plivigligo de informado, respondeculoj de esperantlingvaj elsendoj ktp.

Maŭ francaj gazetoj kaj revuoj dediĉis lastatempe parton de siaj "leterkestoj" al debato pri Esperanto. FO MAGAZINE (N-ro 78) aperigis ampleksan artikolon sub la titolo "UNE LANGUE INTERNATIONALE pour l'Europe et pour le Monde". En 1973 pli ofta temo de la artikoloj aperintaj en Norda Francujo estis la ekspozicioj pri Kopernik. Pri la sama temo, la tutregiona televido elsendis trifoje specialan programon, kiun preparis I. Flaczynski kaj P. Vincent.

Esperanto-Elsendoj Pilo-Press ĉi-semanje povis aŭskulti al Varsovio, Berno kaj Vieno. Varsovio kaj Berno estis bone aŭdeblaj. La Viena Elsendo traktis politikan temon kaj ĉinian ekspozicion kun mencio de El Popola Ĉinio. - Kio estas pri Romo? De semajnoj ĝi ne estas kaptebla. Ĉu denove strikoj de radio-teknikistoj?

## La proksimaj Esperanto-elsendoj de Gdańsk

Pola Radio en Gdańsk sciigas, ke la proksimaj elsendoj en Esperanto okazos jene:

22/23 marto 74 inter 1,05 - 1,30 h sur longaj ondoj 1322 m Varsovio

1 aprilo 74 ripeto je 13,30 h sur ultrakurtondoj

19/20 aprilo 74 inter 1,05 - 1,30 h sur longaj ondoj 1322 m

22 aprilo 74 ripeto je 13,30 h sur ultrakurtondoj

17/18 majo 74 inter 1,05 - 1,30 h sur longaj ondoj 1322 m

27 majo 74 ripeto je 13,30 h sur ultrakurtondoj

La Esperanto-elsendoj en Gdańsk estas nur enmetaĵo en loka distra muzika nokta programo sur la longaj ondoj de Varsovio.

Pri aŭdebleco skribu al Pola Radio Gdańsk, Elsendoj en Esperanto, PL-80-952 Gdańsk, str. Uphagena 1, Pollando

## Esperanto-angulo de Radio Pécs

Ekde majo 1972 en ĉiu monato estas aŭdebla programero de Radio Pécs: "Esperanto-angulo", kiu en hungara lingvo informas la aŭskultantojn pri la okazintaĵoj de la Esperanto-movado internacia kaj de la loka Esperanto-vivo.

Elsendotago: La unuan lundon de ĉiu monato, inter la 17,30 - 18,30 h (MET) dum 5 minutoj sur ondo 344 m (872 khc). La 5 minutoj ĝenerale estas aŭdeblaj inter la 18,15 - 18,30 h.

La disaŭdigo estas kaptebla en la suda parto de Hungario kaj la norda parto de Jugoslavio. Redaktoro estas Pál Felsö.

Skribu al Rádió Pécs, "Eszperantó-sarok", H-7601 Pécs, Pf 200, Hungario

*******************

## Dumnoktaj salutoj de Eŭropa Ondo SAAR

Laŭ informoj de nia "Esperanto-ranĉisto" Erhard W. Matthes el Mannheim Europa-Welle Saar (Eŭropa Ondo SAAR) dum la pasintaj monatoj dufoje salutis la esperantistojn dum la nokta programo. Jen la traduko de la salutoj:

7.10.73 je la 0,45 h: "Kaj nun, miaj karaj geaŭskultantoj, venas stranga deziro...aŭ tamen ne tiel stranga? Ni salutas ĉiujn sinjorinojn, kiuj ankoraŭ solaj estas sur la strato kaj atendas...same kiel ...ĉiujn Esperanto-amikojn en Germanio kaj en tuta Eŭropo..per la kanto "Put your little heart"...

3 feb 1974 je la 0,35 h: "Ni salutas speciale ĉiujn Esperanto-amikojn-kiuj estas ankoraŭ irantaj - kaj ĉiujn radio-amatorojn.........per la kanto hungara....Wegre, wegre (fine, fine)..

Moderatoro de la dumnokta muzika programo estas Manfred Seksauer.

*****************

## Radio Bervalio respondas....

D: Kial Radio Bervalio silentis dum la pasintaj semajnoj?

R: Ne decas aŭdigi Esperanto-stultaĵojn dum karnavalo.

D: Ĉu futbalo povas solvi Esperanto-problemojn?

R: Jes! Per punŝotoj por ĉesigi disputojn kaj egaligi opinidiferencojn.

# Unua Konkurso de la Pola Radio en 1974

- **10-taga ekskurso tra Pollando**
- **multaj premioj kaj memordonacoj**

en enketo de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la jenaj demandoj:

1. **Kiujn internaciajn iniciatojn de Pollando vi opinias speciale gravaj kaj kial?**
2. **Kiuj problemoj estantaj objekto de la debatoj de la Konferenco pri la eŭropaj sekureco kaj kunlaboro plej multe interesas vin?**
3. **Kiuj elsendoj de la Pola Radio en la periodo januaro — februaro 1974, laŭ via opinio, plej interese prezentis la bildon de la nuntempa Pollando?**

La respondojn ni petas sendi al la adreso: Pola Radio, PL-00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando — en kovertoj signitaj per la devizo: „Konkurso", ĝis la 15a de marto 1974 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en niaj disaŭdigoj la 16an de aprilo 1974. La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn. Ni deziras al vi bonŝancon!

Pola Radio

La gastmikrofono de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio atendas la 17-an laŭreaton!

Aŭskultado al la Esperanto-elsendoj plifaciligas la respondadon al la supraj demandoj.

Radio Varsovio ĉiutage disaŭdigas en la internacia lingvo du programojn:
6,00 h - ondolongoj 41 m, 49 m, 200 m
16,30 h - ondolongoj 31 m, 41 m

POLSKIE RADIO

W a r s z a w a

- 10-taga ekskurso tra Pollando
- multaj premioj kaj memordonacoj

En enketo de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj geauskultantoj.

Al partopreno en lotado de la premioj rajtigas respondo almenau al unu el la jenaj demandoj:

1/ Kiujn internaciajn iniciatojn de Pollando vi opinias speciale gravaj kaj kial?

2/ Kiuj problemoj estantaj objekto de la debatoj de la Konferenco pri la europaj sekureco kaj kunlaboro plej multe interesas vin?

3/ Kiuj elsendoj de la Pola Radio en la periodo januaro - februaro 1974 - lau via opinio - plej interese prezentis la bildon de la nuntempa Pollando?

La respondojn ni petas sendi al la adreso: Pola Radio - 00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 15 de marto 1974 /decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en niaj disaudigoj la 16-an de aprilo 1974 j.

La ekskurso de la laureatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio

Detalajn informojn pri la aferoj de la alveno al Pollando donas la eksterlandaj vojaĝagentejoj, korespondistoj de la pola vojaĝagentejo "Orbis" kaj la informaj oficejoj de "Orbis".

Rapidan kaj oportunan vojaĝon al Pollando kaj reen certigas la pola aertrafika entrepreno "LOT".

La reprezentejoj de "Orbis" kaj "LOT" troviĝas en:

- PARIZO, 18, rue Louis - le - Grand, tel. 7420560, 0736226
- BRUSELO, 20, Place Rogier, tel. 18-76-96, 17-65-09
- LONDONO, 313, Regent Street, tel. 580-83-81, 580-70-35
- KOPENHAGO, 21 Vester Farimgade, tel. 14-58-11
- VIENO, 3/4 Schwedenplatz, tel. 63-98-10
- STOKHOLMO, 71, Birgerjarlsgatan, tel. 20-04-15
- NOVJORKO, 500 Fifth Avenue, N.Y., Suite 2125, tel. LOngacre 56-48-116
- ROMO, via V. Veneto 54a, tel. 48-34-48

Krome ni petas ankau anonci sin en la reprezentejoj de "LOT":

- AMSTERDAMO, 64 Leidsestraat, tel.: /020/ 64867
- FRANKFURTO-ĉe-MAJNO, Wiesenhuettenplatz 36, tel. 23-19-81
- HELSINKI, 8, Mikonkatu, tel. 100-88
- MILANO, via Albricci 9, tel. 89-58-36, 89-58-97
- ZURIĤO 8039, Bleiherweg 52, tel. /01/ 36-78-03

ooo

Tralegu kaj montru al konatoj! La premioj atendas!